

URBANOVA

ELI URBANOVA

Nur tri
kolorojn

899.9921
U65n

N.Cham. 899.9921 U65n
Autor: Urbanová, Eli
Titulo: Nur tri kolorojn .



14148435

Ac. 150002

BCCE



5 NELETRAJ KAJEROJ de STAFETO

NUR TRI KOLOROJN



STAFETO
BELETRAJ KAJEROJ
POEMOJ NOVELOJ DRAMOJ ESEJOJ

3

PERGAMUM
BCCE/UFC

NUR TRI KOLOROJN
Libro originale verkita en esperanto

*Ilustraĵoj de Karel Oberthor
Kovrilo de John Hartley
Vinjeto de Mads Stage*

ELI URBANOVÁ

Ac: 150002

R: 14148435/15

23/01/15

NUR TRI KOLOROJN

899.9921
U 72n
NUR
1960



IMPRESINTA GUTENBERG—LA LAGUNA DE TENSRIFE
Depósito Legal TF 215 1959

J. RÉGULO ELDONISTO LA LAGUNA
MCMXX

PERGAMUM
BCGE/UFC

UNIVERSIDADE DO CEARÁ
C. C. L. S. S.
BIBLIOTECA
N.º DE TOMBO 37168



Wilhelmina

PREZENTO DE LA POETINO
FARE DE POETO

Ĉiun literaturon mi imagas, do ankaŭ tiun de Esperanto, per limoj nemezurebla teritorio libera. Sur ĝi ĉiu talento, konvinkita pri sia artistia destino kaj obsedata de interna instigo, havas rajton pretendi kaj okupi peceton da tereno por fari sian propran bedon. Kiom da bedoj, tiom da ĝardeniŝtoj vivantaj aŭ mortintaj. Tre ŝtranga ĝardeno: la plantitaj floroj restas nevelkeble eternaj, nur pli malpli laŭmodaj aŭ modpasintaj, nur pli malpli rememorataj aŭ forgesitaj...

... kaj tiu ŝtranga ĝardeno eŝtas senbarila. Ĉiu interesiĝanto rajtas vagadi inter la bedoj, laŭplaĉe neglekti aŭ primiri la belecon de ĉiu opa bedo aŭ la buntan pompon de la tuta ĝardeno. La survoje vagantoj libere povas elekti el la floroj, kolekti ilin por bukadoj sen difekto de la bedoj, kiuj servas por arta ĝuo de la diversguŝtaj vizitantoj. Milionoj tumultas en la ĝardeno, tamen ne multnombre troviĝas la aprezantoj de tiu anima barakto, kun kiu la ravanta floro iam eŝtis plantata de la ĝardeniŝto...

... ĉar ĉiu artistia animo baraktas, ĉiu poeto, eĉ la plej feliĉa, plej dorlotata de la Vivo, trasuferas la fazojn de la pensogravedo, naskokrizo. Ĝuŝte tiu ĉi barakto havas la ĝermigan povon por akceli la plenan disvolviĝon: burĝoniĝon kaj floriĝon. Tiel naskiĝas la eternaj floroj en la ĝardeno de la Poezio. Jes, eternaj floroj, ĉar inter la vagantoj

ĉiam troviĝas iu, kies atenton frapas jen tiu, jen alia floreto, neglektata dum jarcentoj kaj li ravite aprezas la forgesitan, sed ne velkintan pompon, al kiu porĉiaman vivon spiris la arto de iam surtere baraktanta animo...

En solecaj horoj mi mem tre ŝatas vagadi sur la vojetoj de tiu ĉi ŝtranga ĝardeno. Kun admiro kaj pietato ofte mi haltas jen ĉe tiu, jen ĉe aliabedo: postlasitaj floroj de foririntaj ĝardeniŝtoj de pasintaj epokoj. Tiu florpompo atestas pri tiu nedetruenda printempa fekundeco, kiu ankaŭ nun triumfe ornamas per nova florpompo la homan vivon.

La penso kondukas min al nova parto de la nemezurbla ĝardeno. Tie nur kelkdekjaraj bedoj atendas la vizitantojn. Modeŝtaj floretoj en milnuanca koloro de la Espero tie invitas min. Mia koro pleniĝas je emocio, ĝojplena kaj sentoriĉa. Jam pli ol kvar jardekojn mi paŝetadas en tiu parto kaj ĉiufoje, kiam mi malkovras la estiĝon de nova bedo aŭ mi haltas por karese rigardi, ĝui freŝan plantajon en iu, jam konata bedo, mi preferus premi al mia bruŝto tiujn ĝardeniŝto-kolegojn kaj per tuta sincereco de mia animo danke kaj dorlote ĉirkaŭpreni ilin pro la ĝojo esprimiĝanta en jubilo: «Nia propra ĝardeno plivastiĝas, plibeligiĝas!» La penso, ke tiu modeŝta parto de la tutmonda literatura ĝardeno iam pompados en kolororgio de ĉiu bela floro, kiun la ĝardeniŝtoj de Nova Kulturepoko povos planti, donas al mi senton de tia feliĉo, kiu superas mian esprimkapablon...

... kaj ĝuste dum tia ekstaza vagado haltigis min juna voĉo kun tonnuancoj de timo kaj fido: «Paĉjo, ĉu mi rajtas fari propran bedon en la floriĝardeno de nia esperanta poezio?» Surprizite mi vidis antaŭ mi ravan belulinon kun fasketo da paperfolioj en la mano. Ŝia korkonkera ĉarmo (helpata de dekduo da artaj fotoj), ŝia flatema rideto tiklis

mian vantano koron maljunan, jes, sed multe pli tuŝis ĝin tiu plenmano da poemoj, kiuj perfide elokventis pri tiu barakto, kiun kaŝis ŝia pupa beleco... kaj ĝuste tiu kaŝita barakto prezentis al mi la — *bomon*, kiu atendas amikan admonon kaj kolegan helpon de mi...

... kaj mi reridatis al ŝi kaj transprenis de ŝi la plenmanon da semoj, duongermintaj plantaĵoj, kies ekfloriĝo bezonis unue la preparon de la grundo, la moligon de la sensuka humo, diserigon de la sekaj turbuloj. Miaj leteroj, aluditaj de ŝi en unu el ŝiaj poemoj, helpis *nur* en la fekundiga preparo kaj ne en la selektado, ne en la plantado. Dum jaroj sendiskute kaj tre simple kiel pli sperta ĝardenisto mi parolis al ŝi pri labormetodo, pri kelkaj rutinaĵoj, kiujn ŝi baldaŭ pli malpli — *ne akceptis*.

Tiu ĉi sendiskuta rifuzo ĝojige pruvis, ke mi ne eraris; ŝi estas poeta individuo, maturiĝinta por memstareco. Ŝia iama flata rideto, kiu kuris al mia koro, nun de tie supreniĝis al miaj lipoj. Ĝi fariĝis videbla esprimo de muta fiero, kiam ŝi rikoltis siajn unuajn sukcesojn.

... kaj tute neatendite iun tagon ŝia vigla fantazio elektis direkton al izoligo, al vojeto, ĝis nun ne irata, tra la vivĝangalo. Dum longaj jaroj nur karaj geamikoj, prahanoj aŭ foje-foje poemeto, ŝovita de hazardo antaŭ min, informis pri ŝi... verdire, foje mi sukcesis persone renkonti ŝin, interesiĝi pri ŝia farto kaj post longmomenta manpremo la unua kaj lasta ree pasis jaroj...

... tute surprize antaŭ semajnoj ŝi vizitis min per — letero. La intima tono de ŝia parolmaniero ne ŝanĝiĝis. Nur la sordino de la intertempe trasuferitaj jaroj iom moderigis, vualigis la junecan tinton de ŝia voĉo. Avarvorte la enhavo de tiu letero estas: «Paĉjo, rigardu mian florbendon kaj diru vian opinion pri ĝi al la legantaro!»... kaj nun kun kora emocio mi foliumadas la manuskripton de ŝia

poemaro, la floraron de nova bedo de mia debutanta kolegino: ELI URBANOVÁ.

Interese, ke dum la legado vualigás por mi la konataj trajtoj kaj aperas silueto ĝis nun nekonata, eble nur konjektata.

La iom pesimisma titolo *Nur tri kolorojn* ne timigu, ne erarigu vin, kara leganto! Ombroj de la ekzistado estas videblaj nur ĉe la suna flanko de la Vivo. La nuancoj de la nigro plej ofte servas por relieĝo de konturoj, por pli akra videbligo de tiuj kolornuancoj, al kiuj abunde radias la suno. Tiel estas, eĉ se mem la poetino ne konscias pri tio. La senombreco, glutanta eĉ nuancojn de la nigro, apartenas al la regno de la Morto. La poezio kaj ĝiaj floroj, havantaj nuancojn de nigro aŭ grizo, ĉiam estas festaj fenomenoj de la Vivo. La poezio, kvankam ĝi ne estas kruda realaĵo, tamen reflektas tiun laŭsencan veron, tiun realon, kiujn oni ne povas rimarki per vidorgana observado.

Tiu ĉi poemaro — spite al la titolo, promesanta nur tri nuancojn de unu koloro — estas plena de reflektajoj, kiuj havas sur si la kolorojn de la vivo kaj tiujn laŭsencan veron, kaj realon, kiujn oni povas videbligi nur poeta talento... kaj ELI URBANOVÁ estas poetino, juna ĝardeniŝtino en la florĝardeno de nia esperanta poezio.

Eble al taskoj de prezentanto apartenas paroli pri unuopaj poemoj, sed miaopinie ne estus dece alvoki la atenton al apartaj versaĵoj, eĉ tre ŝatataj de mi, ĉar per tio vole nevole mi trudus mian preferon al fremda guŝto. Ĉio ĉi estas ja superflua! Mia tasko estis nur konduki la ŝatantojn de la esperanta poezio al tiu nova bedo, kies floroj mem plej elokvente pledos por la poetino, al kiu mi, unu el la veteranaj ĝardeniŝtoj, dediĉis antaŭ jaroj ĉi tiun versaĵeton:

*Vi, kara fratino sur kamp' poezia,
kun ruĝo de roz' kaj blanko lilia
aperis por ĉarmi, revojn disŝuti...
Mi, bardo maljuna, povas nur muti
kaj mire jubili pri pompa florigo
de juna talent', parenca en riĉo
de sentoj kaj pensoj ritme muzikaj...
En versoj vi vivas. Per mozaikaj
penetraĵoj de l' ĥoro volu fideli
al lingvo, al lir' por ravi nin, Eli!*

Julio Bagby

Budapeŝt, 7. XI. 1959

NUR TRI KOLOROJN

PERGAMUM
BCCE/UFC

NUR TRI KOLOROJN

DUM la ceteraj sin koncentris
por miksi farbon kun la farbo,
mi miajn bildojn simple pentris;
ja mi surmetis per la karbo
nigretan, nigran kaj nigregan.

Plena paletro min konsternis.
Kreante scenojn fantaziajn
mi ĉiam ree uzi lernis
nur tri kolorojn kaj ne pliajn:
Nigretan, nigran kaj nigregan.

Enue! Krios la unuaj
kaj la aliaj eĉ: Funebre!
Mi tamen trovas superfluj
mil ilojn; mi tro taksas eble
nigretan, nigran kaj nigregan.

Se luksan kadron bunt' aspiras,
je ligno vokas skizo sopra.
Mi tre sincere tion diras!
Preferis mi laŭ gusto propra
nigretan, nigran kaj nigregan.

Oka loko en Zagreb 1933

PRI MI MEM

VIZAG' de pupo, porcelane pala.
Do ne aparta, male: Tre banala.
Ĝi morta ŝajnus certe, se du aŝtroj
(nigraj pupiloj, unu el kontraŝtoj)
ne brilus larĝe de sub okulbrovoj.
Kio alia? Jen fiaskas provoj
dum la serĉad' pri ĉarmo speciala.
Vizag' de pupo, porcelane pala.

T_{IO}M mi deziris
 ian havi!
 Per ĝi ravi!
 Silkon mi disŝiris.
 Fi! Mallaŭdo.
 Blanka haŭto.

Dio kun kompato
 vidis tion:
 Havu ion!
 De nun sur manplato
 jen fortuno:
 Sun' kaj luno.

LAŬ mia edz',
 al kiu multajn dankojn,
 de la gepatroj
 heredis mi nur mankojn.

Ja aŭdas mi,
 pardonon, eĉ tro ofte,
 ke mi naskiĝis
 por peki tage-nokte.

Brrr . . . Havas mi
 neniun bonan econ.
 Se vi ne kredas,
 demandu mian edzon!

DUM sobraj tagoj, cetere malmultaj,
 mi homo estas preskaŭ tutnormala,
 ĉar tre simila al edzinoj ŝultaj:
 Mi mastras hejmon per man' radikala.
 Sur la pargeto rampas mi serpente,
 super lavtrogo festas mi triumfon,
 se mi eksidas, do nur pormomente
 kaj plej verŝajne mi riparas ŝtrumpon.
 El kuirejo ŝvebas bulb-odoro;
 odoro ege por la naz' agrabla.
 Ni manĝas bone, je preciza horo . . .
 Kia mi estas? Preta kaj kapabla!
 Eĉ reŝtas tempo por legadi, ŝtudi,
 per mask' mirakla viŝi trajtojn velkajn,
 por korespondi, jes, pianon ludi,
 kun najbarino perdi vortojn kelkajn . . .

Sed tag' ebria! Forgesitaj devoj.
 En mi sin nome akumulis premo.
 Sur sof' mi kuŝas, dronas mi en revoj . . .
 Kaj la rezulto? Ploro aŭ poemo.

1922. Cetere
 la daton konas mi parkere
 (mi memortenas ja neniun),
 ĉar mi naskiĝis jaron tiun.

Nu, kiel ĉiu sana ido
 tuj plor' mi eŝtis, tuj ekrida.
 Ah, panjo, kia pacienco!
 Kaj temis sole pri komenco.

Diru, ĉu ebla la enuo?
 Paĉjo min lulis sur genuo . . .
 Se li min trovus nur aminda!
 Sed lia amo eŝtis blinda.

De la tondil' kaj alumeto
 ŝirmis min mia fratineto.
 Helena — nomo tiel bela!
 Mi diris al ŝi simple Hela.

Por fari el mi la ekzemplon
 oni bezonis certan tempon.
 Mi lernis danki kaj saluti,
 do dece, laŭ bonton' konduti . . .

Ankoraŭ estis mi infano
kaj plenumita granda plano:
Ni translokiĝis al urbrando
en propran domon kun verando.

Hela ĝojkriis: «Jes, ĝardeno!
Kaj balancilo! Kaj baseno!»
Kiam nin panjo ludi lasis,
tie rapide tempo pasis.

Ĉiuvespere poŝt laboro,
kutime antaŭ naŭa horo,
paĉjo rakontis ĉe la lito
pri la unua modmilito:

Pri sia viv', dum regis krizo,
pri la subita mobilizo,
pri ofensivo je komando,
pri legioj, pri Ruslando . . .

Kiel mi amis paĉjon mian!
Neniu spertis ion tian.
Kaj panjo — mi ŝin ĉirkaŭbrakis.
Neniu tiajn kukojn bakis.

Ne devis mia paĉjo timi,
ke instruisto plendos pri mi.
Eksidis mi en benk' giganta
kaj ĉiu vorto estis sankta.

Desegni damojn, ankaŭ beŝtojn
poŝtulis sole kelkajn geŝtojn.

Kaj plej sukcesis, eĉ sen scioj,
precipe tipaj proporcioj . . .

Nur panjo, panjo min ne laŭdis.
Ĉar «pro oreloj mi ne aŭdis».
Nur panjo, panjo ĝojon bridis.
Ĉar «pro okuloj mi ne vidis».

Dum tag' tralegi tutan libron!
Jes, panjo perdis ekvilibron.
Ŝi antaŭ paĉjo rompis manojn:
«Jen Eli legas jam romanojn!»

Reŝtis rifuĝi al kuniklo,
ĉiam dankema por la tiklo,
aŭ mi kun hundo de najbaro
konkure kuris sur herbaro —

Transiro en la gimnazion
superis mian fantazion.
Kvankam mi penis, vere lernis,
tamen ateŝto min konsternis!

De nun permesis al mi paĉjo
nur iom legi, ne laŭ plaĉo.
Krom tio, ho ve, li kontrolis,
ĉu mi ekstere ne petolis . . .

Kaŭzo de certa embaraso
estis la knaboj en la klaso.
Bubaĉoj! Sed la baroj falis
kaj ni babilis kaj batalis . . .

Min persekutis pens' insiŝta:
Legi en libro kuraciŝta.
Fine! Vidante nudan viron
mi naŭzon sentis kaj deziron . . .

Mi kelkajn versojn skribi provis.
Ĉar aŭskultantojn mi ne trovis,
mi sendis ilin al gazeto.
Aperis tiu poemeto.

Mi decidiĝis dum minuto:
Pedagogia instituto.
Kaj pravigita la aludo —
lernado tie eŝtis ludo.

Des pli okupis min plezuroj
de cent naivaj aventuroj.
Ĉu ne, tuttaŭgis eta juŝto
pro kis' ŝtelita poŝt arbuŝto?

Venis la temp' de dancohoroj . . .
En vico ŝtaris la sinjoroj
kaj inter ili — for, frenezol!
Mi dancis kun li ĝis noktmezo . . .

Mi ne plu eŝtis ja infano.
Al Di' mi dankis, ke sen amo
nedeŝtinite morti al mi,
sed pro feliĉo granda larmi . . .

Librovendiŝto riskis faron
eldoni mian poemaron.

Eterna rev'. Ne. Rememoro
je jam fermita vund' de l' koro . . .

Jen kio iĝis taga temo
poŝt la matura ekzameno:
Ĉu mi lokiĝos? Anoncsondo
kaj mi atendis do respondon . . .

Muziklernej! Mi brulis febre,
sed mia panjo kompreneble
profetis al mi, ke mi plendos,
ke oni min tuj reen sendos . . .

Ĉu aŭdis panjo unu ĝemon?
En Prag' mi trovis duan hejmon.
Ĉiuj min ŝatis: Mia ĉefo,
lia edzino, filo Ŝtefo . . .

Ĉar mi ne timis ŝuojn ŝmiri
kaj plankon lavi kaj kuiri,
kaj kiam tion mi satĝuis,
ludi pianon mi instruis . . .

De kie mi la fortojn ĉerpis?
Multfoje mi eĉ nokte helpis.
Ĝis nokt' plej nigra finon portis:
Patrin' de Ŝtefo — jes, ŝi mortis.

Mi, dudekjara, sur vivsojlo,
subite ŝtaris antaŭ solvo . . .
Jam poŝt monato eŝtis nova,
ke mi nomiĝas Urbanová.

Ja kia ŝanĝo en praktiko?
Ĝis la vespero nur muziko:
Violonĉelo, flut', gitaro . . .
Ofte hirtigis la hararo!

Kaj re funebro . . . Ni soligis . . .
Ĉu por forges' ni nin dediĉis
al societo? Ĉe ni homoj
alternis kiel noktfantomoj!

Pli ol diskut' kun kamarado
min tenis fata versfarado.
Io rezultis el izolo:
Aŭ poemet' aŭ karambolo.

Kaj poŝte — poŝte Esperanto.
Min verso ravis, Ŝtefon kanto.
Kvazaŭ aperus sun' surscene . . .
Viv' ne finiĝis. Ne, ne! Ne, ne!
Ne, ne!

SUPER LA LETEROJ DE JULIO BAGHY

EBLE mi reŝtus ĝis nun nekonata.
Jes, granda danko ligas min al bard'
Julio Baghy . . . Li per frazo flata
fratin' min nomis, fratin' en la art'.
Dek, dudek, tridek, tridek ok leteroj!
Kortuŝa eŝtis lia oferem'.
Jen cent konsiloj. Cent kritikaj eroj.
Kelkloke versoj: Poem' de li mem!
Kaj li eĉ trovis vortojn plej karesajn . . .
Nur unufoje ĝojis li sen ĝoj':
Neologismojn? Sole la necesajn!
Alie falsa eŝtus via voj'!

Baghy . . . Mi havis lian simpation.
Sed mi sopiris! Ege! Ege! Tro!
Kiel indulge li toleris tion,
kiel admonis: Trompus vin hero' . . .
Pasis du jaroj . . . En ekŝtazmomento
Hetajr' naskiĝis, nome poemar'.
Ĉar jam kulminis en mi mia sento,
ĉar jam ribelis mia sango, ĉar — —
Diablo, helpul! La diablo venis.
Mi finis ciklon — ho, feliĉa hor'!
Al vi, Julio! Ĉion li divenis:
Min amo venkis kaj li eŝtis — for.

Omi vin nomas tiel simple: Dio.
Jen blankulino, fama pro fier',
antaŭ vi kuŝas . . . Humil' estas tio,
kio min, nudan, ŝetis al la ter'.

Vi plej potenca! Ja sen via volo
ne movos sin folio sur pomuj!
Ho, min rigardu kaj en mia koro
la sopirata pac' ekregos tuj!

Ĉar ne du viroj, nun du mondoj rekte
pro mi batalas — furioze, vel!
Unu min amas kaj mi lin . . . Perfekte!
Unu sklavigas . . . Ne, neniam re!

Ah, ĉu ankoraŭ li freneze batos
ĉi mamojn spitajn? Kredas mi, ke jes!
Finiĝos lukto . . . Dio, vi kompatos —
per lia venko, per lia sukces'!

Dio, mi scias, mi ne estas inda,
sed mi lin amas — tre, tro, ĉiam pli!
Mi, blankulino kun animo hinda,
kiun komprenas sole vi — kaj li.

Al Marta

Kiel vi fartas, animeto? —
Eh, vi ektimis superflue,
nur pro momenta malkvieto
mi telefonas tiel frue!
Nome hieraŭ post la meso
mi meditadis pri mi, pri vi . . .
Kaj, animeto, sen konfeso
tutsimple mi ne povas vivi!
Ĉar mi vin ŝatas. . . Ĉar ni estas
pli ol fratinoj, ĉu ne vere?
Sed io al mi fremda reŝtas,
por ke parolu mi sincere . . .
Via preĝej' de katolikoj.
Teatron ludas celebranto!
Kvankam impresis min prediko,
kvankam kortuŝis min la kanto!

Jen kion diri mi ne timas:
Al mi imponas la brahmanoj.
Ankaŭ mi kredas kaj eŝtimas
grandan Naturon, grandan Amon.
Jes, animet', mi brulas, brulas!
Se vidus vi en la vizaĝon!
Kaŝi konvinkon, ĝi torturas,

do mi kolektis la kuraĝon!
Mi solvis tion telefone . . .
Ja, animeto, mi esperas — —
Mi petas? — Aha! Bone! Bone!
Ĉefe, ke vi min ne koleras!
Ah, animet', vi diademo!
Vi aŭdus mian koron batil!
Dankegon por la toleremo!
Kaj ke ne ĉesis vi min ŝati!

KONFESO

Ne, mi ne havas multajn sciojn;
jen kion mi neglektis,
dum febre mi kolektis
impresojn, emociojn.

Ne, ne penetris mi pli funde
en ian fakon gravan,
nur en revregnon ravan;
meditis mi profunde.

Ne, fanfaroni mi ne povas
per saĝo de kleruloj;
en certaj du okuloj
ĉion, min mem mi trovas.

FINE MIAN VIVPROGRAMON

FINE mian vivprogramon:
Povus eŝti mi poeto.

Tute ne pro fantazio
(plej perfekta en pasio).

Tute ne pro firma volo
(ion doni al popolo).

Povus eŝti mi poeto,
ĉar mi havas grandan amon.

TRA PRAHA

EN nia ŝtrat' nek eta mov',
 nek sensacie freŝa nov'.
 Periferia avenu'
 tro muta pro enu'.

Dubinde, ke nur je ornam'
 en la fenestro blanka mam'
 gigante gapas el muslin'
 de fama klaĉulin'.

Sed kion sekvas la spion'??
 Aŭskultas ŝi; kun monoton'
 ree kaj ree maĉas man'
 kantaĉon sur pian'.

Tramarŝas knaboj — migra trib'.
 Aperis io . . . Jen surskrib'
 ŝokanta per la freŝa nov':
 Leganto eŝtas bov'.

MIKSITE ŝvebas en kastelĝardeno
odoroj pezaj de jasmen' kaj rozoj
kaj jen dancante meze de baseno
kliniĝas nimfoj en tre ĉarmaj pozoj.

Diskrete, ĉaste trema ondspegulo
redonas ilin tra iriza duŝo.
Ne unufoje haltis mi, revulo,
antaŭ ĉi nimfoj . . . Tiel, pro kortuŝo.

Zefir' facila mi deziris eŝti,
la ŝultrojn kisi sub asperg' fontana,
en blondaj bukloj por moment' ekneŝti,
al nimfoj fluŝtri pri l' sopiro vana.

Eĉ nun mi teksas revojn, tamen sveno
jam grizpatine kuŝas sur la koro . . .
La nimfoj reŝtis junaj ĉe l' jasmeno
kaj dancas plu kun rido el marmoro.

Oka loko en Oslo 1952

Mi vidas ŝin kaj pensas: Damo.
Ŝi iras supren al la tramo
numero dekkvin. Laŭ la modo
ŝi kombis al si noblan nodon — —
Mi ankaŭ eŝtis kiel pupo;
mi ne rapidis en okupon,
ne devis kuri poŝt la pano.
Mi vidas ŝin kaj pensas: Damo.

Damo. Ŝi bone edziniĝis.
(Kaj kiomfoje li feliĉis
havante tian en la lito?)
Mi ankaŭ veŝtis nur kvaliton.
Apud parulo kun titolo
ankaŭ mi ludis certan rolon.
Kaj al la homoj ĝi sufiĉis:
Damo. Ŝi bone edziniĝis.

Damo kaj tamen serviŝtino.
Kun ŝrangaj sentoj en animo
mi sekvas ŝin kaj kofron ŝian.
Simile vivis eĉ mi iam.
Eĉ mi, regule tro kompleza,
portadis ilin, ofte pezajn!
Eĉ mi klopodis ĝis la fino:
Damo kaj tamen serviŝtino.

LILIE blanka
 estas korp' de Vintro.
 Vidante Ŝin
 sur la tegmentoj kuŝi
 kun cĉ' glacia,
 kun virgpura ventro
 vi, la unua,
 iel timas tuŝi.

Blindiga belo
 elloganta larmon.
 Kion Ŝi scias
 pri la urbapavimo?
 Vi, la unua,
 taksas Ŝian ĉarmon
 kaj baraktadas
 inter pi' kaj krimo.

Tamen vi rabis,
 homo senkompata.
 Jen la unua
 kaj li sin ne bridas!
 Ĉar ĉiu tuŝo,
 eĉ plej delikata,
 postlasis signon,
 kiu vin perfidas.

KIEL sur dornoj somnambulo
 mi paŝas ĉirkaŭ la angulo,
 centfoje haltas, plu promenas — —
 Kaj ŝi ne venas!

Kredu min, homoj, nur hazardo
 min ree gvidas al bulvardo!
 Sed mil okuloj tuj divenas:
 Ha, ŝi ne venas!

Ie ŝi klaĉas en komforto,
 dum min ĉi tie aĉa sorto
 pri l' pacienco ekzamenas . . .
 Do ŝi ne venas!

Certe frizaj' aŭ nova robo
 absorbis tempon de la snobo!
 Amara kraĉo min venenas.
 Fi, ŝi ne venas!

Kia enuo! Kia tedo!
 Palpante je la cigaredo
 virinan genton mi malbenas.
 Ĉar ŝi ne venas!

Reŝtas foriri . . . Jen — subite —
 subite ĉio pardonite,
 agrable, mole mi mienas.
 Jes, ŝi jam venas!

Vi ĉiuj mirus mian guŝton,
ĉar ŝtranga aĵ' min ree tiras.
Rompu la manojn, faru krucon,
al mi la bildo multe diras!

Jen koridor'. Jen ŝi . . . Ŝi gardas
tenante supre la kandelon.
Tamen sen timo ŝi rigardas,
ne kaŝas al li sian belon . . .

Knabin' kaj viro. Sperta viro.
Kia kontraŝto — barb' kaj mamoj!
Turmenta estas la sopiro.
Turmenta, ho ve, estas amo . . .

Vi laŭte sakrus. Vi forkraĉus.
Jam perdis mi ĉe vi estimon.
Se tiu bild' al mi nur plaĉus!
Mian ekmovis ĝi animon.



VETUR' ĉi tien daŭras horon,
 sed mi, mi pagus ĝin per oro!
 Krajonon kune, en bireto
 rapidas mi al rivereto;
 laŭ ĝi belega voj' kondukas.
 Kaj tuj apude tia suka
 herbej' — hodiaŭ sen la kaproj.
 Nur poste rokoj. Rokoj kiel Tatroj,
 tre romantikaj, vid-imponaj.
 Ofte sufiĉus paŝ' malbona — —
 Kaj tombsilento en la branĉoj.
 La Prahaanoj dum dimanĉo,
 eh, tiuj dormos ĝis la deka!
 Krom tio estas ter' malseka
 kaj oni devus grati ŝuojn.
 Kia trankvilo! Kia ĝuo!
 Mi aŭdas sole birdojn kanti . . .
 — Pink! Pink! Mi ŝatus ŝin demandi,
 kion pripensas ŝi, izola?
 — Glik! Glik! Mi ankaŭ! — Vi scivolaj!
 Mi el pasint' instruon ĉerpas.
 Nun, ho ve, baroj min malhelpas.
 Fine min venkas la imago,
 ke foje tamen venos tago — —

— Rik! Rik! Rik! Baroj, kiaj baroj?
— Loĝej' ekzemple, jam kvin jarojn!
Jes, kia ĝuo kaj malĝojoj!
Sed mi ne vidas sur la vojon!
Mi viŝas al mi la okulojn —
jen, geamantoj! Timemuloj,
ili subite ne sopiras.
Pro kelkaj kisoj, mi vin miras!
Ĝis renkontiĝas ni sub pinoj
kaj mi distingas du virinojn!
Kaj ree unu folieto
ne movas sin . . . En pac', kvieto
staras la kverkoj, eĉ junaĝa
betulo supre . . . — Ci kuraĝa!
Ci inter ŝtonoj bele blanka!
Ci scias, kiu al mi mankas,
ci konas kaŭzon de korbato!
Mi ne bezonas surogaton,
kia feliĉo, jam kvin jarojn!
. . . kvin jarojn! Kvazaŭ tuta valo
ekmuĝus eĉe, per venkvoĉo.
Kvin jarojn jam de am', diboĉo!
. . . de am', diboĉo! Mi dankema,
mi plej dankema, laŝte ĝemas:
— Ĉu ne, paruo, pigo, pego,
kion ni spertas en urbego!

BESTA PARADO

HUNDO

EN la fenestron nokt' rigardas,
la luno naĝas tra l' kurten',
mi ĝian movon fide gardas
kuŝante ĉe l' kamen'.
Atente flaras mi al pord',
murmure ehas mia vort':
Forrr . . . de la dom',
forrr . . . fremda hom',
averton pri la mord'!

Orel' ekŝtaris enkontrole:
Ba, ĉie regas pac', kviet'.
En hirtaj haroj nur petole
kaŝludas la pulet'.
Suspekta son' el koridor'!?
Revenas hejmen la sinjor'!
Kaj sekvas boj'
kaj granda ĝoj'
laŭ ĝuŝta hunda mor'.

EN ARBARO

Vi tra arbaro iras nun
gvidata de la nazopinto.
Kaj pendas super labirinto
lantern' unika: Pala lun'.
Kaj perlas ŝvit' sub pelerin' . . .
Ĉu lup'? Fantomo? Nur imago?
Jen aŭdu: Dum erarzigzago
embuske iu sekvas vin . . .
Konŝterne vibras mort-intrig'
el flug' susura de vesperto . . .
En for' ululas kun averto
funebroŝn profetanta ŝtrig' . . .

Kaŝtelo ŝtaras en proksim';
ĉielon tranĉas la konturo
de forlasita nigra turo,
ne loĝas tie homanim'.
Horloĝ' ekbatis per si mem — —
Naĝante super kaŝtelruboj
la lunon kovris grizaj nuboj
kaj ĉiu bat' — eltomba ĝem'.
Vin kuras froŝt': Dum noktomez'
aperos lum' en tura truo,
tambure klakos oŝtobruo,
skeletoj dancos en frenez'.

Okazu tamen kio ajn,
ne lasu ŝoki vin, vaganto,
la disonancoj de l' noktanto
montriĝos baldaŭ trompa ŝajn'.
Vin la unua sunradi',
ankoraŭ nana, malkuraĝa,
denove faros sobre saĝa,
vi ridos eĉ pri l' komedi'.
Jes, mokos vi pri l' mortbrakum':
Vi ja ne eŝtas timemulo!
(Al dorm' sin ŝternos en nebulo
fantomoj monŝtraj de mallum').

Kaj vere — cedas la krepusk',
arbar' vekiga el medito.
Purpure fajras amanito
en freŝe aspergita musk'.
Ornamas branĉojn perloj mil
kaj spinas inter la piceoj
arĝentajn retojn araneoj,
vin akompanas birda tril'.
Arbaro vivas . . . Kun persiŝt'
fagtrunkon garde frapas pego.
Kioma zorgo, kia flego
de la arbara kuraciŝt'!

Vi haltas gape pro surpriz':
Sin fleksas ritme herba molo
sub la hufet' de kapreolo . . .
Domaĝe! Glutis ĝin kulis' . . .
La lastan pin-etaĝon ĵus
sciur' atingis akrobate.
Bivakas vi por miri flate,

sed vane petas pri konus'.
Vi sidas, eta hompigme',
rigardas supren al la alto — —
Subite ve! Risorta salto!
Formikoj marŝas en arme'!

Mirteloj dolĉaj, fraga kamp'
konvenas al la apetito.
La sun' rapidas al zenito
brulante kiel granda lamp'.
Varmega tago! Kun diskret'
murmuras akvo en filikoj.
Sin svingis io sur silikoj;
Kolubron portas riveret'.
Vi ĝin poŝtvadas kun envi',
ĝis panoram' de regiono
en la kvieta monotono
etende vaŝtas antaŭ vi...

Dua premio en Oslo 1952

LEONO

Vi memorigas al mi la leonon.
«Rrripozu, karral!» Se ŝi volus ŝtumpli
trans lia kruro! Ŝi al li, fripono,
bone komprenis, sed ne emis, grrrumblis.
Ĉu ne, Leonĉjo, vi min tien gvidis?
Ĉu ne, Leonĉjo, sub ni muĝis pinoj,
kiam ni foje inter ŝtonoj sidis
sur via nigra pluvopelerino?
Du metrojn de ni ŝtrigo sin sunumis.
Dormema, ŝtulta, ja matene blinda.
Kaj vi min kisis kaj vi min brakumis...
Kaj ĝi oscedis — estis ĝi ridinda!
Kvankam sufiĉis ĵeti la mantelon
kaj ni ĝin havis, tamen sen intrigo
ni ĝin observis. Ĉu ne estas vero,
dum sen indigno gapis nin la ŝtrigo?

Vi memorigas al mi la leonon.
Li ŝin ne ĉesis pete ĉirkaŭiri.
Fine ŝi falis... Kia unisono!
Kiel fortege ekmurmuris ili!
Ĉu ne, Leonĉjo, tut-alia, riĉa
fariĝis mia ordinara vivo?
Ĉu ne, Leonĉjo, estis ni feliĉaj,

kiam ni foje reŝtis sur deklivo?
Ni povis sekvi interesan bildon:
Mizera aro nome vane ŝtrebis
sugeŝti timon al la raba birdo,
kiu persiste super bosko ŝvebis.
Kirko ne kriis; ĝi fierkvieta
ĉiam pli alte ĉizis siajn cirklojn — —
Kvazaŭ atakus iun homoj etaj.
Kvazaŭ ĝi eŝtus unikul', ne kirko.

Vi memorigas al mi la leonon.
Pasio pasis, nun li dormos! Ho nel!
Li lekis ŝin . . . Li sentis dankbezono!
Nu, beŝto reĝa! Pensis ni enfone.
Ĉu ne, Leonĉjo, kulpis mem la amo,
ke mi forgesas la mortintan patron?
Ĉu ne, Leonĉjo, manon premis mano,
kiam ni foje adiaŭis Tatrojn?
Tondroj kaj fulmoj — poŝte sun', silento.
Ni ne renkontis unu homanimon . . .
Subite — aglo! Ĝi sur firmamento
proksimiĝadis, serĉis la viktimon!
Tiel surpriza eŝtas nur medito!
Ni ambaŭ haltis, glutis la spektaklon
tra tuj prenitaj verdaj okulvitroj — —
La laŝta tago kaj ni vidis aglon!

Vi memorigas al mi la leonon.

FANTAZIAJ SCENOJ, FATAJ RENKONTOJ KAJ FABELOJ

ANTAŭ feŝtago. Du virinoj
 liliojn brodas sur muslino.
 Marta je Anjo okulpendas:
 «Respondu, Anjo, mi atendas!»
 «Amante pensas ni pri morto.
 Signo el ĉiuj plej, plej grava.
 Alia amo — nura vorto,
 malplena, kava, senenhava».
 Anjo brodajon nun kontrolis,
 silenta reŝtis, ne parolis.
 Elspiras Marta: «Amo rara!
 Ankoraŭ ion, Anjo kara!»
 «Kaj kiu amas, sklavas tute,
 tamen katenojn siajn benas,
 fidela ĉiam absolute . . .
 Ja pri la amo vera temas!»
 Anjo grizharan kapon klinis;
 nur brodi, brodi ŝi inklinis.
 Ekrevas Marta: «Am' ekziŝtas.
 Daŭrigu, Anjo!» Ŝi insiŝtas.
 «Do eĉ post jaroj ni memoras
 forton de fajr'; ĝi ne finflamis.
 Ĝi plu impresas, plu doloras . . .
 Sed tiam sole, se ni amis».
 Kial brodajo teren falas?
 Kial vi, Anjo, plorbatalas?
 Vangon de Marta kovris ombro:
 «Anjo! Ĝi eŝtas am' ĝis tombol!»

DU DEMANDOJ

I

Mi vin demandas, pro diablo,
ĉu venis vi por min provoki?
Al vi, sinjor', mi rajtas voki:
Forlasu nin, tuj for de l' tablo!

Ke vi obeos, jen probable;
jetita gant' vin ŝajnis ŝoki.
Mi vin demandas, pro diablo,
ĉu venis vi por min provoki?

Ja kia pruvo pri kapablo
grimaci iun aŭ primoki?
Sed kavalir' ne emas koki
per ŝtulta vort'; ekgrincu, sabro!

Mi vin demandas, pro diablo!

II

Mi vin demandas, ah, pro Dio,
kial vi tiel mute kuŝas?
Sub vi sangruĝa herbo pluŝas...
Ĉu jam finiĝis tragedio?

Pardonon... Kia apatio!
Tremante mi la manon tuŝas...
Mi vin demandas, ah, pro Dio,
kial vi tiel mute kuŝas?

Ne helpas vorto, eĉ ne tio,
ke mi la ŝultrojn pete puŝas,
ke krias mi, dum larmoj duŝas:
Nin iam ligis simpatio!

Mi vin demandas, ah, pro Dio!

«OKAZIS antaŭ noktomezo . . .
 Venis fremdul' kun agla naz' . . .
 Mi vendis min . . . Je kia prezo?
 Por fulmmomento de ekŝtaz'».
 «Nek gren' prosperas,
 nek la vino,
 sorĉistino!»
 Ĝis nun ne vidis tian nudon
 urbo escepte ekŝcitita.
 Do diŝtru vin! Do pruvu prudon
 per kruco hipokrita!

«Sekvis — sovaĝa amindumo.
 Min nur ekregis malkviet',
 kiam aperis en lunlumo
 hufo anŝtataŭ la pied' . . .»
 «Nek gren' prosperas,
 nek la vino,
 sorĉistino!»
 Ekzekutiŝt' en poz' konvinka,
 tiu ne timas ian sorĉon.
 Al bel' vi lernis esti blinda,
 jam tempo, kaptu torĉon!

Baldaŭ diskuris onidiro,
 ke belulinon en kaban'
 vizitas ŝtranga kavaliro;
 neniŭ eŝtis ol Satan'.
 «Nek gren' prosperas,
 nek la vino,
 sorĉistino!»
 Jes, satrigardu, sciivoluloj,
 rapide brulas ligno, pajlo!
 Nutro tro forta por okuloj.
 Viktimon lekas fajro.

«Ĉu iu — tiel min karesis?
 Ĉu iu kisis — kiel li?
 Sub tur-men-ti-loj mi konfe-sis
 la tu-tan verrr-on kaj eĉ — pli . . .»
 «Nek gren' prosperas,
 nek la vino,
 sorĉistino!»
 Jen adiaŭo . . . Kaj sen danco.
 Jen adiaŭo . . . Kaj senkante.
 «Eŝtu damni —!» Laŝta franco — —
 Ŝi falas cindriĝante.

RIVALOJ

Ni ekŝtaris vang' al vango.
Muĝis sango!
Muĝis sango!

Mi mezuris lin malame.
Li min same.
Li min same.

Mi forkraĉis elokvente.
Li samtempe!
Li samtempe!

Firmpremiĝis mano mia.
Ankaŭ lia!
Ankaŭ lia!

Pugno frapis la fiulon.
En spegulon!
En spegulon!



VIN apogante je kolono
vi cigaredon fumis mute . . .
Samtempe dio kaj demono,
vi min ekkravis tuj kaj tute,
por ĉiam.

Okuloj viaj de cigano
al mi hipnote ŝajnis brili.
Kvazaŭ anĝelo kaj satano
delogi volus min per ili
por ĉiam.

Kia feliĉo! Kaj sufero!
Pri l' am' mi pensis, pri la morto . . .
Ĉielo mem kaj mem infero,
vi min sklavigis eĉ sen vorto
por ĉiam.

REVENO

«Je via sanol!»
Oni festas.
Edzo denove
hejme estas.
Ŝi paŝis en la
koridoron
kaj sentas bati
sian koron.
Ĉu li ne sidas
inter gastoj?
Kvazaŭ radius
ŝin du aŝtroj,
ah!

Ĉiuj kapjesas:
«Bona vino!
Vivu sinjor' kaj
sinjorino!»
Okazis ĝuste
sub la luŝtro.
Nun li ŝin premos
al la bruŝto!
Preterirante
kun rideto

li montras al ŝi —
bankbileton,
ah!

«Ĝis fund', amikoj!»
Ora homo.
Sed kie restis
dam' de l' domo?
Tial li brilis
pro feliĉo.
Malgaje gapas
ŝi tapiŝon . . .
Kokosan. Ruĝan
kiel sango.
Kaj larmoj fluas
sur la vango,
ah!

NE plu amuzis la principinon
 kun pilko ludi kaj kun pupoj.
 De sur malnovaj kaŝtelŝtupoj
 rigardis ŝi al malproksimo . . .
 Paŝtejoj — boskoj — panoramo.
 Ofte principino tie sidis,
 ĝis ŝi nebule ĉion vidis;
 fine ŝi pensis nur pri amo:
 Alrajdos princo . . . Kvazaŭ ŝi jam
 malklare aŭdus tra la valo
 paradgalopi la ĉevalon . . .
 Li ŝin ekamos tuj, por ĉiam.

Ke la principin' sin supre lokis,
 iom ĉagrenis reĝan patron;
 tamen ne faris li teatron,
 sole kelkfoje vane vokis.
 Cerbumis li: Dorloti idon
 en la principino, estus ŝtulte . . .
 Da reĝaj zorgoj pli ol multe . . .
 La reĝ' preparis do decidon:
 Lia najbaro en provinco
 havas tri filojn, ĉarmajn vere;
 li provos peti perletere
 viziton de l' plej aĝa princo.
 Ĉiel' de ŝteloj jam plenplena;
 ĝi baldakenon ronde formis

super kaŝtel' . . . Principino dormis . . .
 Jen kion songis ŝi, revemal
 Maljunulin' kun vango ŝtranga
 sin al ŝi klinis parolante:
 «Principin', sopiras vi konstante
 je amo; amo daŭra, granda.
 De nun vin gardos amuleto;
 akceptu jenan kol-ornamon,
 ĝi helpos al vi trovi amon!»
 Kaj malaperis silueto.

Principin' apenaŭ matenmanĝis,
 kiam aŭdiĝis tra la valo
 paradgalopo de ĉevalo.
 Surprizo, kiun reĝ' aranĝis.
 Per ĉapo ŝvingas princo ĉarma:
 «Principino, estu salutita!»
 Unu ridet' — panik' subita.
 En bruŝton batas io varma!
 Ja kiel diris songo nokta:
 La amulet' sur kolo pendis
 kaj signis: Lin do ŝi atendis . . .
 «Bonvenon, gaŝto tre malofta!»

Kaj pasis tago ĝoje, glate.
 Principin' kaj princo, ĉiam kune,
 babilis, fluŝtris, ridis june . . .
 En bruŝton bat! bat! delikate.
 La dua tago — tag' de veto.
 Ili konkuris per pafarko,
 poŝte petolis en la parko . . .
 Ankoraŭ varma amuleto.
 Dum tria tago iom pluvis.

Oscedis princ' kaj riverencis.
Ĉu rev' perej jam komencis?
Malvarm' sur bruŝto tion pruvis.

Kunpremis dentojn patro reĝo
ne tolerante inan ploron.
Kiel mildigi la doloron?
Ĉar lian planon trafis peĉo.
Rezignis li do tut-escepte
pri l' gimnastiko sur teraso
kaj tuj, sen ia embaraso,
al frat' de l' princo skribis rekte.
Kaj forsendinte kurieron
en la dormejon li sin fermis . . .
Kastelon baldaŭ ronk' konsternis;
kuracis reĝo la koleron.

Princin' apenaŭ matenmanĝis,
kiam aŭdigis tra la valo
paradgalopo de ĉevalo.
Surprizo, kiun reĝ' aranĝis.
Per ĉapo ŝvingas princo ĉarma:
«Princino, estu salutita!»
Unu ridet' — panik' subita.
En bruŝton batas io varma!
Ja kiel diris songo nokta:
La amulet' sur kolo pendis
kaj signis: Lin do ŝi atendis . . .
«Bonvenon, gaŝto tre malofta!»

Kaj sekvis tagoj en la vico:
unua, dua, kvina, sesa
kaj ĉiu estis pli promesa
kaj tiel fuĝis kiel kiso.

Kaj ree suno supren saltis
kaj ree kun unika ŝtelo
vesper' sin ŝtelis en kastelon . . .
Ha! Kial princ' en halo haltis?
Hazardo kaŭzis karambolon:
Virinon vidis princ' sur bildo —
dum sepa tago flugis birdo.
Kia malvarmo ŝarĝis kolon!

Sulkiĝis dense reĝa frunto.
Ĉar ĉio ŝajnis jam en ordo
kaj nun — cent tondroj! Nova zorgo.
Kaprica knab'! Bubaĉ'! Kaj punktol
Kiel marist' la reĝ' malbenis,
sed poŝte venis al konkludo,
ke iam eĉ fiaskas ludo;
ja riskas, kiu entreprenis.
Laŝte skribite trans la kampon.
Bildon, pentritan vere arte,
kaj pro prudent' kaj pro si parte
lokis la reĝ' en laborĉambron.

Princin' apenaŭ matenmanĝis,
kiam aŭdigis tra la valo
paradgalopo de ĉevalo.
Surprizo, kiun reĝ' aranĝis.
Per ĉapo ŝvingas princo ĉarma:
«Princino, estu salutita!»
Unu ridet' — panik' subita.
En bruŝton batas io varma!
Ja kiel diris songo nokta:
La amulet' sur kolo pendis
kaj signis: Lin do ŝi atendis . . .
«Bonvenon, gaŝto tre malofta!»

Kaj daŭris danco dum ok tagoj.
Sed proksimiĝis tago naŭa
kaj falis vorto adiaŭa . . .
Princ' sin preparas por forvago.
Nun reĝo princon flanken tiris:
«Antaŭ ol oni ponton levos,
sciu, ke doton ŝi ricevos!»
Promesis reĝ', ĝis princo miris.
Malfrue. Ne plu interesis
princinon eĉ plej arda peto.
Ĉar diris al ŝi amuleto,
ke naŭan tagon amo ĉesis.

Paŝtejoj — boskoj — panoramo.
Kiu kondukas malobee,
supre sur ŝtupoj sidas ree?
Princin', revanta pri la amo.
Pri tia amo, kies forton
dento de l' tempo ne detruas,
kiu nur kreskas, evoluas,
kiu transvivas eĉ la morton . . .
Tiun vesperon ŝi malĝoje
observis sian patron karan.
Irante serĉi amon raran
princino kisis lin laŝfoje . . .

Migris princino sen ripozo
tra mil paŝtejoj, boskoj ombraj,
kaj ŝiaj kruroj — vundoj nombraj,
kaj signo ŝia — sang' en roso.
Ho amo, amo! Daŭra! Dolĉal
Poŝt vi mi paŝos ĝis mondfino.
Longege vagis la princino
sur kol' kun amuleto sorĉa . . .

Jam krepuskiĝis . . . Suno sinkis
al rozkolora horizonto . . .
Mortlaca venis ŝi al fonto . . .
Iu soife tie trinkis.

Kaj ŝi ekvidis kun kortuŝo
el liaj kruroj flui sangon
kaj suferplenan lian vangon
kaj ĝem' eliris el la buŝo.
Nun li sin levis; por momento
li ŝin rigardis mirigite . . .
Okazis kiel fulm', subite:
En la princin' eksplodis sento.
Krius ŝi, kantis — ŝi ne povis;
preskaŭ samtempe ŝi konstatis,
ke io varma bruŝton batis . . .
Ĉu li, serĉanto, ankaŭ trovis? —

Jen la kaŝtel'. Jen nigra ŝtrio.
Funebre pendas ĝi, funebre.
«Malfermu, paĉjo!» «Ah, neeble!
Filino mia! Mia ĉio!»
Poŝt ĉirkaŭpreno: «Du vi eŝtas!»
Mienas reĝo tre feliĉe;
ĉu ne, li zorgis jam sufiĉe,
do tutnature cedi reŝtas . . .
Princin' — ne, ŝi jam ne posedas
la amuleton; de l' renkonto
ĝi varmon donas al la fonto . . .
Kiu ektrinkis, tiu kredas.

PRI MALJUNULO, KIU RAKONTANTE
PRINCINON RAVIS

«**N**UR unu dancon!» Petis kavaliroj.
«Nur unu dancon kun vi, ho, princin'!»
Fine ŝi diris: «Eŝtu laŭ deziro!
Se rakontante iu ravis min!»

Eh, kavaliroj multe, multe aŭdis,
ja legis eĉ . . . Ĉar tio gravas, ĉu?
Princin' aŭskultis — ne, neniun laŭdis;
sekvante nubojn ŝi oscedis plu.

Jen — maljunulo. Poŝt krad' li spionas.
Ke li spionas? Eŝtis sole ŝajn'.
Princin' viviĝis: «Venu! Mi ordonas!
Rakontu ion! Jes, tuj! Ion ajn!»

Do — do en sonĝo princ' princinon vidis
kaj lian koron vundis ŝia bel' . . .
Li, tiel gaja, nun neniam ridis,
ĝemoj, nur ĝemoj sonis tra l' kastel'.

Vane lin oni por ĉasad' persvadis;
prince preferis revu en izol'.
Li tage-nokte inter bedoj vadis
ŝin imagante kontraŭ sia vol' . . .

Ĝis unufoje — eŝtis frumateno
kaj ĉio dormis krom princ' kaj ĉeval' —
sen adiaŭo, sen patrino beno
li forgalopis tra la verda val'.

Baldaŭ la princon venkis malespero,
kiam la beŝto haltis de si mem,
kvazaŭ ĝin iu forĝus al la tero.
«Prince, kompaton!» Almozulo, jen!

Prince kompatis. En man' diafana
ektintis oro . . . «Prenu, almozul'!»
«Prince vi bona, pro la am' malsana,
mi legas en vi kiel en spegul'!

De nun la beŝton liberiri lasu!
Poŝt sep arbaroj lago montros sin.
Naĝu kurage! Kio ajn okazu,
pri ŝi nur pensu, pri ŝi, la princin'!»

Falis ĉevalo, kie lag' disfluis . . .
Prince naĝante aŭdas voĉojn mil:
«Pli bravajn virojn tamen ni detruis!»
«Princino mia!» Eŝtis plu trankvil'.

Apenaŭ prince kelkan spiron ĉerpis,
ho ve, mil voĉoj ree apud li:
«Pli bravajn virojn ni dronigi helpis!»
«Princino mia!» Savis lin la kri'.

Kiel li naĝas, lagon kovris ombro.
Kaj re kaj re, dum lin forlasas fort':

«Pli bravajn virojn pelis ni al tombol»
«Princino mial» Fine — fine bord'.

«Kredu, princino, estis stranga lago . . .
Mi ĝin transnaĝis duonviva nur . . .
Kaj vekiginte vidis mi en akvo,
ke mi aspektas kiel maljunul' . . . »

«Lerta fripono! Ĉar ne estas vero!
Jes, ci mensogas!» Ĉiuj mokis lin.
«Tiom da amo! Tiom da sufero!
Kun vi mi dancos!» Diris la princin'.

Ili ekdancis . . . Ah! Ŝi ne komprenas.
Ĉu estas eble? Kun li — kia ŝanĝ'!
Ne maljunul', sed bela princ' ŝin tenas!
«For, kavaliroj! Lokon por fianc'!»

EL LA KORBO

RIĈA MALJUNULO

KIUN, kiun nur al mi memorigas
tiu maljunul'? Io nin kunligas . . .
Cerbumadas mi, en la kap' komparas — —
Ĉu mi eraras?

Rigardante min li lipharojn frotas.
Naŭza gastronom', sed li ne dorlotas
sole per la vort'; eŝtas li tre riĉa.
Moto sufiĉa!

Kiun, kiun nur — — le ni nin vidis . . .
Kvankam tipa vang', tamen lin perfidis
la frandema mov' . . . Jen motivo, ke mi
devas ektemi:

Eŝtis mi infan' . . . En izol' mi ludis . . .
Li — li rabis min! Kaj mi same nudis,
kiam vendis li kiel varon vantan
idon plorantan . . .

NE, hodiaŭ ne! Al mi viroj naŭzas.
Iru jam, sklavin', vi koleron kaŭzas!
Se mi dancas nun, do por ĝojo propra.
Por mi, tutsobra.

Paŝoj tien ĉi . . . Malaperu iel
Eŝtu mem Cezar', senceremonie
mi elĵetos lin! Ĉar al mi ne plaĉas,
ke li kuragas.

Jen, eĉ kiu ajn — je rigard' ne inda.
Se mi dancas nun — — Ĉu li eŝtas blinda?
Aŭ mutigas lin mia haŭt' neĝblanka?
Ĝeŝto senmanka?

Ŝparas vi pri vort'; pri arog' ne multe!
Aŭdu min, sinjor', vi kondutas ŝtulte!
Mi komprenas vin: Ĉion por denarol
Dioj! Cezarol

NE nur por ornam' eŝtas enangule
tiu bela vaz'; poŝti orgi' regule
mi ĵetadis ja en senkulpan varon
unu denaron.

Iam tintis ĝi per tre gaja tinta.
Nun en truda mut' de tro-satiĝinto
pozas la amfor' en malluma fono
de la salono.

Dika jen matron' kun ventreg' graveda.
Tiel pensas mi, oscedema, teda,
kaj renversas ĝin sur tapiŝa pluŝo.
Riĉa akuŝo!

Flavkolora or' tra la manoj iras.
Strange; tia tint' kaj nenion diras.
Tien ĉi, sklavin'! Kial gard' envia?
Ĉio — la vial

DU MARISTAJ

PERGAMUM
BCCE/UFC

ADIAŭ, tero! Nazojn de la bando
 incitis baldaŭ la odor' de brando.
 Je via san' ni toŝtos, kapitan',
 oho, oho, hoj, johoho!

Ne daŭris longe — bruo sub ferdeko.
 Ĉar trinki akvon estus morta peko!
 Je via san' ni toŝtos, kapitan',
 oho, oho, hoj, johoho!

La mar' ekdancis, tamen el la kelo
 gaje sin rulas poŝt barel' barelo.
 Je via san' ni toŝtos, kapitan',
 oho, oho, hoj, johoho!

Brrr — uragano! Nia laŝta horo!
 Ne rompas kanton la raŭkanta ĥoro.
 Je via san' ni toŝtos, kapitan',
 oho, oho, hoj, johoho!

La ŝip' kliniĝis. Sarkofago sinkas!
 Fil' Mil diabloj! Ni la akvon drinkas!
 Je via san' ni toŝtos, kapitan',
 oho, oho, hoj, johoho!

NENIE firma tero,
 nenie la ripoz',
 ni naĝas tra l' infero
 de tondra furioz'.
 La maŝto krakas ĝeme
 kaj knaras la ŝtangoj',
 baraktas ŝipo treme
 vipata de la mar'.
 Joho! Joho!
 Hoj! Johoho!

Nenie firma tero,
 nenie la trankvil',
 minacas nin danĝero
 el ĉiu fulma bril'.
 La pruo frakasata
 per la diabla gest',
 sed familio rata
 plu kantas en la nest'.
 Joho! Joho!
 Hoj! Johoho!

Nenie firma tero,
 nenie la esper',

fulmtondre en aero
 ridegas Lucifer'.
 Sovage flirtas flago
 sub nigra firmament'
 dum nia al-mort-vago
 sen pent', sen testament'.
 Joho! Joho!
 Hoj! Johoho!

GUTOJ DE INTIMO

PERGAMUM
BCCE/UFC

AMI!

TRAVIVI amon freneze skuan,
dangĝeran, krudan kaj detruan,
kiu ne timus eĉ mortigi!

Ekvivi forte! Ho, ami ree!
Perdiĝi tute, memperee
en sankta fajro de pasio!

EN sonĝo nur
ni niajn korpojn tuŝas
tremante pro volupt',
en sonĝo nur
mi en la brakoj kuŝas,
venkito jen sen lukt'.

En sonĝo nur
ni pekas sen pudoro
regataj de pasi',
en sonĝo nur
mi tra feliĉa ploro
diradas al vi: Ĉi!

TIA kiso...
Neniu kisis min ĝis nun...
Mi por longege perdis vortojn...
Kion mi pensis en brakum'?
Unu, nur unu: Morton. Morton.
Tia kiso...

HO, TAGOJ DOLĈ-AMARAJ!

Ho, tagoj dolĉ-amaraj,
dum devas ni esperi!
Ĉar vin ne vidi, kara,
signifas plu suferi.
Ho, tagoj dolĉ-amaraj,
dum devas ni esperi!

Ĉu por la kor' amanta
sufer' ekzistas plia?
Se jes, nur unu granda:
Vin vidi, kara mia . . .
Ĉu por la kor' amanta
sufer' ekzistas plia?



PEZA VINO

JA eŝtis peza vino,
kiun ni trinkis kune.
Flamruĝa laŭ koloro,
laŭ gust' tre dolĉa, ĉu ne?
Ni toŝtis . . . Du pokaloj
ektintis pro la ĝojo . . .
Trinkite — ĝis la fundo.
Ah, je kioma fojo?

Kaj pasas tag' poŝt tago
en vico senvaria
kaj jen anŝtataŭ sobri
mi eŝtas plu ebria . . .
Ne volas trankviligi
la pulseganta sango.
Mi pezan vinon sentas
ankoraŭ sur la lango . . .

DIKTIS DANKEMO

PERGAMUM
BCCE/UFC

MIOZOTOJ

*Al la mortotago
de d-ro ZAMENHOF*

ESTAS tut-etaj bluaj floroj.
Kaj ŝatas ilin raraj koroj.
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Jen krepuskiĝas . . . Eĉ sen dubo
sur frunt' de panjo naĝos nubo . . .
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Min regas certa maltrankvilo:
Ĉu ili kreskas en aprilo?
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Al JULIO BAGHY

NUN kvazaŭ ombro kuŝus kun obŝtino
sur via liro. Ŝajnas, ke dum triloj
sufokas kordojn preme la sordino.

Ĉu vin ne logas plu la vivobriloj?
Pri l' papilio kanti vi forgesis
pro senflugilaj, tedaj mondbaciloj?

Pli frue tono dolĉa nin karesis,
abundis ŝercoj, pinĉis nin satiro — —
La ombraj trudoj ja nur parentezis — —

Avide ondas la legantspaliro,
soifa jam je via rido rima . . .
Divenis vi, subiĝis al inspiro

kaj kiel iam en kapric' anima
vi *Papiliojn* ree kreis arte
en helmomento, en humor' subluma.

Sed ve! Ne ŝvebas ili flirte, arde
por peti de lilioj kismielon;
en kor' pikitaj pingle —perponarde—

reflektas ili la flugilan belon,
rigidan, mortan, en muzea halo
fiksita draŝte en vitrinkarceron. — —

Bizare rava eŝtas la regalo,
ho, bardo! Poŝt la larm' fluinta verse
vi ekridetas; ŝiras sin vualo

de l' ombro, torturanta vin perverse.
Ni scias: Cedos, cedos la angoroj,
la lum' parados sur la lir' disperse.

Ni scias: Flirtos tra l' irizkoloroj
la papili' denove kun galanto
kaj papilie al lazur' de l' foroj
jubile, gaje ŝvebos via kanto.

SUPER «PRINTEMPO EN LA AŬTUNO»
DE JULIO BAGHY

LEGANTE mi kelkfoje ploris
kun vi, herooj de l' rakonto.
Doloroj viaj min doloris,
ja mi sopiris je renkonto.

Unua am'! Poem' unua.
Betuloj blankaj supre tremis . . .
Ne, ne plu ebla lego flua!
Mi tiom, tiom plori emis . . .

Ĝis laŝta paĝo mi interne
reteni devis mian ploron . . .
Adiaŭ, karaj! Por eterne
mi vin enskribis en la koron.

D-RO KAMARŬT SEPDEKJARA

DUM la aliaj sin amuzis,
profiton tiris, eĉ misuzis,
vi instruadis, oratoris,
redaktis, verkis: Vi laboris.

Dum la aliaj sole ŝajnis,
flatojn, titolojn, rangojn gajnis,
vi organizi nur preferis
kaj zorge gvidi: Vi oferis.

Dum la aliaj . . . Tion flanke.
Al vi ni ĉiuj pensas danke,
danke rigardas en okulon.
Do dankon! Dankon! Kaj gratulon!

*Al s-anino JULIE ŠUPICHOVÁ
okaze de ŝia 70-jara jubileo*

Mi foliumas en volum' malnova
kaj jen min kaptas tuj unua paĝ':
... kaj inter tiuj, kiuj kun kurag'
portis la torĉon, eŝtis Šupichová.

Ĉu vin ne venkas ia sento festa,
kiam vi legas pri escepta hom'?'
Do Šupichová, tiel sonas nom'
de l' heroino, tamen tre modesta.

Kaj mi konfesas: Al mi kaŭzas ĝojon,
ke en movado rolis eĉ virin'.
Ja Šupichová eŝtis, kiu sin
konscie donis por lumigi vojon.

*Al d-ro PUMPR por lia perfekta
traduko de K. H. BOROVSĀY:
«La bapto de caro Vladimir»*

Tiu plej eminentaj
antaŭen sin ne puŝas,
sur ili ĉiam kuŝas
taskoj temprabaj, gravaj:
Ho, tiuj vere bravaj,
ho, brava vil

Tiuj plej eminentaj
silentas pri l' diplomoj,
ja ili kiel homoj
al ni jam iĝis karaj.
Ho, tiuj vere raraj
ho, rara vil

Tiuj plej eminentaj
neniam false pozas,
sed sian sulkon fosas
por ni kaj eksterlandaj.
Ho, tiuj vere grandaj,
ho, granda vil

Al aktorino EVA SEEMANNOVA

U NUE la impresoj
de ege belaj kruroj.
Mi ĵurus, ke al ili
fiksiĝis la okuloj.
Detaloj: Harlinio.
Ŝanĝema bril' de broĉo.
Kaj tamen tre, tre baldaŭ
nenio — nur la voĉo.

Via ton' tragedia!
Iu postukon serĉas.
Ĉar eŝtas vi unika,
kiam vi larmojn verŝas . . .
Jes, Eva, al vi rozojn!
Bukedon grandan, sciul!
Kaj al la kor' vin premi
kaj danki por ni ĉiuj.

I AM vi ŝajnis al mi ŝtranga.
Pardonon, nome eĉ tro granda.
Kial vi tiel multe kreskis?
Iam vi por mi fremda eŝtis,
jes, vi, sinjoro prezidanto,
simile kiel Esperanto.

Nun mian frunton kovrus nuboj,
se vi nur mankus en la klubo,
se vi malsanus — ne, neeble!
Mi vin bezonas tie nepre!
Vi hom' unika . . . Jen konvinko.
Min same gajnis nia lingvo.

Al JAN ZEMEK

KELKAJ akcentas: Nur, nur ano.
Ĉar vi ne skribas pri la amo,
ne kreis unu belan kanton.
Vi eĉ forgesas Esperanton!
Kelkaj akcentas: Nur, nur ano.

Kiu kolerus miopulojn?
Verfakte frapas en okulojn,
jes, tuj ekscitas ĉies senton
la ŝtel'. Insigno el arĝento!
Kiu kolerus miopulojn?

Ho, mi ĝin vidas, pioniro!
Vojon trabis vi por miloj
kaj dank' al via laborego
rikoltas laŭrojn mi, poeto.
Ho, mi ĝin vidas, pioniro!

Al sinjoro KYNĈL

LA homoj kredas
en hazardojn. Ne mi.
Pleniĝis tempo
kaj mi devis veni . . .

Ĉu vorto «amo»
movis mian koron
aŭ tio eble,
ke vi vendas florojn?

Ho, certe belajn!
Ruĝajn! Bluajn! Blankajn!
Kaj oni kantis.
Kaj mi kantis ankaŭ.

Mi, lernantino
el la laŝta benko
nur devis veni.
Via eŝtis venkol!

HETAJRO DANCAS

Al JULIO BAGHY

*Se similas tro la rakont' al vero,
kredu: Temas nur pri artaj', fabelo.
Do herooj du, kiuj en ĝi rolas,
sole simbolas.*

HETAJRO DANCAS

KIEL en kristal' jus ŝirita floro
pompas vi, amant', en la kadra oro,
ŝvebas florparfum' tra l' izolsilento:
Dolĉa amtentio.

Eŝtas nura ŝajn' reciproka logo,
bela trompo nur — okuldialogo.
Nur naiya lud', sed ĝi iĝas fajro.
Dancos hetajro.

Kaj jam falas for la veluro — punto — —
Kvazaŭ movus vi per la hela frunto,
kvazaŭ vere nun fulmaperus briloj
en la pupiloj . . .

Kantas mia korp' nudan kanton tange — —
Kisu, kisu min, kun pasi', ĝissange!
Pro volupta trem' mi ebric svenas — —
Kaj vi ne venas!

Ne etendas sin en avid' la mano,
male: Via trajt' — moka rid', rikano!
Je l' unua foj' mi verŝante larmon
kaŝas la ĉarmon . . .

Poŝt la plorkonsol' la raci' admonas.
Sciu do, amant', ke mi vin pardonas,
ĉar ne tuŝas ja kia ajn plezuro
bildon sur muro.

ANTAŬ SPEGULO

KLARE hela sun' el la lito logas.
Ah, spegul', spegul', ĉu vi ne mensogas?
Diru vi, sklavin', ĉu spegulo pravas?
Vere, mi ravas!

Iom palas mi... La ruĝilo? Dankon.
Miru, ŝtultulin', mi toleros mankon.
Daŭre trudas sin tragedia sceno
en la areno.

Ne tro da parfum'. Ĝi por ĝojo taŭgis.
Longe luktis li... Oni tre aplaŭdis...
Poŝte — eh, renvers'. Li fatalon spite
skermis vundite...

Kiel kombi min? Estas ja egale...
Ĉar funebras mi, do spiralu fale
mia nigra har'... Tia vir' kuraĝa,
bela, junaĝa!

Lasu sen ornam'. Afliktita koro.
Mortis, mortis li, la gladiatoro.
Sed mi vidas min kvazaŭ tra nebulo
en la spegulo...

Unua premio en Haarlem 1954



ĴALUZO

FEBRA fajro min frumatene pelas
al lazura for', kie bosk' kapelas.
Fea rifugej' kun la dolĉe lula
belo betula.

Tre ŝatata lok'. Mi enpaŝas pie . . .
Sed subita halt' . . . Kvazaŭ subkonscie
sin malfermas lip' por konstata' dolora:
Lito amora.

Longe gapas mi pro ekscit' rigide
al sveninta herb', kiu je orgi' de
geamanta par' elokvente montras,
nupton demonŝiras.

Kaj leviĝas jen el animkonfuzo
ŝtrange skua sent' . . . Ĉu envi? Ĵaluzo?
Venas re kaj re la fantom' de ardo:
Pika ponardo.

Estis rava nokt' . . . Mia kor' sopiris . . .
 Jus de arb' al arb' mi dancante iris,
 kiam sentis mi: Min okuloj gardas,
 iu rigardas!

Haltis dum petol' la flirtema kruro.
 Dioj, kie punt'? Kie la veluro?
 Savu min, laget', per kompata kovrol
 Vana manovro — —

Salto el arbuŝt' . . . Min englutu, terol
 Tro malfrue jam; super mi — panterol
 Kvazaŭ sciis li, kio longe urĝis,
 forte min forĝis — —

Nun komprenas mi, kial ter', lageto
 mutis kun trankvil' al sincera peto:
 Ĉar plenumis sin en la nokto rava
 leĝo plej grava.

Poste pentis li: Via belo kulpis,
 ke mi rabis ĝin, ke mi ĝin uzurpis.
 Ĉu li rabis ĝin? Ĉu mi mem ĝin donis?
 Do mi pardonis . . .

Tiel romp'is sin virgulinnaivo.
 De la rava nokt' en mi pulsas vivo,
 viv' sekvanta tuj post' invad' abrupta:
 Nupto volupta.

Vi instruis min je unua fojo:
 Estas ama akt' kaj sufer' kaj ĝojo.
 Inde por la ĝoj' en doloro droni.
 Volu ordoni!

Ĉion rajtas vi; pri la prem' ne pentu,
 kisu, mordu min, per la ung' turmentul
 Jen paliĝas jam sur la nuko cigna
 ŝtampo poŝsigna.

Baldaŭ venos vi. Kiel dolĉa verol
 Venu, venu tuj! Ree en rivero
 fluos fajra laf' . . . En vulkana bano
 naĝos titano . . .

Cedas la kurten' . . . Via man' ĝin tenas.
 Fine! Fluŝtras mi kaj sub kiso svenas . . .
 Interrompe nur tremetadas frazo
 dum la ekstazo:

Ah,
 mi tiom,
 tiom amas vin,

 mia Julio!

VIGLAS la salon' ... Ja anŝtataŭ dormi
vi parolas plu ... Kia ĝuo por mi!
Kia plezureg' por la rond' amika,
mia unika!

Ĉion scias vi: Oratori, glosi ...
Do nur lasu min ĉe l' genu' ripozil!
Ĉu ne sklavas flor' al la suno dia,
mia radia?

Sento regas min, dum vi flugas pense:
Ami, ami vin ĉiam pli intense,
el la tuta kor', kun sindon' escepta,
mia perfekta!

Iros amikar' ... Izoliĝos sofo ...
Eta antaŭ vi, tia filozofa,
ŝtaro mi en hont', en sufer' interna,
mia eterna!

PERLA kolier' sur la nuko pompas.
Stranga amdonac', se ĝi koron rompas.
Kunpremiĝu, buŝ', por ke mi ne krii:
Plaĉil! Al kiu?

Ne, ne kredas mi, ke vi baldaŭ venos.
Daŭros la milit' kaj sen fin' sin trenos
ĉiu opa tag', ĉiu nokt' izola.
Sola, do sola!

Froŝte frida bel'. Kvazaŭ larm' al larmo
perloj ligas sin kun malgaja ĉarmo.
Kvazaŭ volus vi laŝtkaresi min aŭ
diri adiaŭ ...

Falsa la konsol'. Ĉar en la pupilo
ĵus perfidis vin tre suspekta brilo.
Ankaŭ la admon'. Ĉar post la riproĉo
tremas la voĉo.

Perlojn fiksis vi. Ili ŝarĝe pendos
ĉirkaŭ mia kol', dum mi vin atendos,
malvarmigis min, dum mi, ah, sopiros,
dum vi martiros ...

Ĉu vi iras jam? Nel! Ankoraŭ vorto!
Ke vi amos min ĉiam, ĝis la morto,
same kiel mi ... Nun for! Senprokraŝtel
Kison ... Ja laŝte ...

Ho, diino, vi, kies blanka bel' ĵus
lumas en la lun' . . . Plej potenca Venus,
min rigardu nun kaj aŭskulti ŝatu
kaj min kompatu!

Diktas la sufer' al vi diri ĉion.
Aŭdu: Revis mi iam Aspazion
roli por hero' . . . La heroo venis . . .
Ĉu vi divenis?

Kaj pereas rev' . . . Kien ajn li iris,
mi ja kulpis nur, ke mi tro sopiris . . .
Sed mi donis pli ol avidan karnon.
Vidu la larmon!

Petas mi, diin', per arkan' konfirmu,
ke memoras li . . . Ho, diin', kaj ŝirmu
kaj favoru lin; li meritas bonon.
Por li — pardonon!

Kia signo, ah! Kaj erar' nebla:
Malaperas lun' poŝt la nub' funebra . . .
Kion al mi, ve, tiu nub' alportis?
Venus! Li mortis!

Nu, ŝafido, nu! Jen la herb' folia!
Mangu, frandu do, ŝafideto mia!
Jen la salo, ek! Kaj ne timu, leku!
Ŝafo, ne bleku!

Ĝoje saltu ni en konkur' ŝercluda:
Hop! Kaj hop! Kaj hop! Sur ĝardeno tuta!
Kial blekas vi? Jen desert' konvena,
freŝa, sukplena!

Ah, ŝafid', ŝafid', kiel ci similas
eĉ tro al mi mem . . . Por vi ne utilas
lukso nek la vart' . . . Ĉar vi je revido
ploras, ŝafido!

Sed ne ploru jam! Vin ankoraŭ kisos
via ŝafpatrin' . . . Jes, ni ŝin surprizos!
Ŝi karesos vin . . . Ŝi vin amas, sciul!
Min nur — neniu!

ORGIO

EN la haroj — roz'. En okuloj — febro.
De nun via rond'! De nun for funebro!
Ke ebrias mi — bagatel', detalo.
Supren, pokalo!

Petis vi pri danc'. Nu, mi ne proteŝtas.
Poŝt longega faŝt' mi denove feŝtas.
Jes, promesas mi — vi deziris tion —
kroni orgion.

Ĉu pro fajra vin', kiu min trakuras,
ĉu pro am-avid' mia korpo brulas?
Eh, por kio veŝt'? Por ŝirita eŝtil'
Feŝti, ej, feŝtil'

Dancas mi al cent, sole unu vidas.
Kun modeŝt' de sklav' en angulo sidas
ĉarme juna knab', ne ankoraŭ viro.
Kia inspiro!

Dancas mi al cent, unu vidas sole.
Ĵus ruĝiĝis li, certe kontraŭvole!
Vipas la pudor' tre, tre dolĉan krimon
en la animon.

Fluu, fajra vin', ci rubenkolora!
Toŝti emas mi je la ĝoj' amora!
Sed kun unu nur! Tamen plej profunde.
Sklavo, ĝisfunde!

KIAM DOLORO KULMINAS

FINE la okaz'! Mi libere agos!
Ne, ne, maljunul', por ĉi nokt' mi pagos!
Jes, insultu min! Ordonita tio.
Diru: Beŝtio!

Multe ŝparis vi antaŭ ol aĉeti.
Sed mi volas min en abismon jeti!
Prenu skurĝon — jen! Nepre ne kompatu!
Batu! Do batu!

Pli! Nur pli! Nur pli! Ĝis — ĝis pro doloro
cedos la sufer' de l' rompita koro ...
Pli! Respektu ja la pasipoŝtulojn!
Faru makulojn!

Vi senpova, vi ... Al mi skurĝon donu,
por ke nun mi mem mian karnon spronu!
Kia plezureg'! Vi okulojn fermas ...
Mi vin konsternas!

Kiam eŝtos fin' de la danc' sovaĝa?
Ho ve, baldaŭ jam mi fariĝos saĝa ...
Aŭdu, barba bub', kion vi kunkreas:
Beŝto pereas!

PRO VI, PATRINO!

JEN! Mi haltis eĉ. Io ekodoris
el sendita roz' . . . Jam mi rememoris:
Patro nomis min ofte, kun ripeto,
sia rozeto.

Ne plu estas ver' . . . En Azi' ni neŝtis . . .
Ah, feliĉa hejm', kie vi nur reŝtis?
Kie vi, patrin', kun brakumo varma?
Frato vi ĉarma?

Oni ŝtelis min; mi fariĝis varo.
Mortis pasintec' post la vasta maro . . .
Noŝtalgias mi . . . Pro parfum' de nura
rozo purpura!

Roz' de adorant' . . . Ĉar denaroj naŭzas.
Sed eraris li; tiu rozo kaŭzas,
ke finiĝis danc' . . . Jes, por ĉiam — fin!
Pro vi, patrino!

SONĜO

EN la brua rond', kvankam tre adora,
sola eŝtis mi, senespere sola.
Fakte havis mi nuran intereson
trovi forgeson.

Funde en anim' doloriga dorno.
Ah, likvidi ĝin dum balzama dormo!
Longe regas min unu pet', ne plio:
Venu, Julio!

Lumo en la pord' . . . Difane pura
paŝas al mi vir' en la tog' purpura.
Li, Julio mem! Mia patro, frato,
mia amato!

Kion portas li? Ĉu ne oran liron?
Eksonoris kord' . . . Mi retenas spiron . . .
Kaj jam tra l'aer' melodio mola
ondas konsola . . .

Dioj, kia bel'! Kiel rara sento
vibras el muzik' de ĉi instrumento!
Ludu, ludu do! Al olimpa alto
levas la arto.

Pasis melodi', kun la dorm' ĝi pasis.
Aŭ mi sonĝas plu, aŭ mirakl' okazis!
Jen sur sofa ruĝ' — je plej granda miro —
oras la liro.

KIAL venis vi? Kial vi min cias?
 Mi nenion ja pri hieraŭ scias.
 Revas mi kun lir' en la brak' ovala.
 Lala, lalala . . .

Jes, malvarmas mi . . . Kaj do pasas horoj
 kaj kun ili viv' . . . En feliĉ', sinjoroj!
 Mole fluas nun tra la lip' korala:
 Lala, lalala . . .

Ne arogu! For! Kiel al vi diri — —
 Ludi emas mi — nu, bonvolu iril
 Brua bakanal' forgesita, pala.
 Lala, lalala . . .

Vana via pet'. Dum vibrad' de l' kordoj
 falas sen efik' eĉ plej belaj vortoj.
 Ĉu ne trinkis mi el la fund' pokala?
 Lala, lalala . . .

Tostu! Sed sen mi! Mi la liron kultas.
 Kiu mokas min? Kiu min aŭskultas
 en komprena mut' ĝis kadenc' finala?
 Lala, lalala . . .

VASTE vaŝta lag'. Sen konsola vorto
 remas la barkist' al alia bordo.
 Diru al mi ja, ke li mem vin sendas,
 ke li atendas!

Daŭras la ignor', dume ond' poŝt ondo
 apartigas nin de la brua mondo.
 Unu vorton nur: Ĉu ni renkontiĝos?
 Jesu! Sufiĉos!

Mi komprenas jam, kien trans ondaron
 forkondukas min silentema Ĥaron.
 Jen herbeja bord', la mortint-azilo.
 Stagnas remilo.

Kaj mi vidas nun ĉe la cel' de l' celoj:
 Ombro levas sin inter asfodeloj
 per konata mov', kun malpacienco . . .
 Fino . . . Komenco?

Egale tria premio en Zagreb 1953

ENHAVO

PREZENTO DE LA POETINO FARE DE POETO de *Julio Baghy* 8

Nur tri kolorojn [Enkonduka poemo] 17

PRI MI MEM:

Propra bildo 21

Aparta signo 22

Laŭ mia edz' 23

Dum sobraj tagoj 24

Curriculum vitae 25

Super la leteroj de Julio Baghy 31

Disiĝo 32

Kiel vi fartas, animeto 33

Konfeso 35

Fine mian vivprogramon 36

TRA PRAHA:

Nia ŝtrato 39

Nimfoj 40

Virino kun kofro 41

Vintro 42

Ŝi ne venas . . . 43

Irante ĉirkaŭ bazaro	44
Valo de ĝemoj	47
BESTA PARADO:	
Hundo	51
En arbaro	52
Leono	55
FANTAZIAJ SCENOJ, FATAJ RENKONTOJ KAJ FARELOJ:	
Amante . . .	59
Du demandoj	60
Sorĉistino	62
Rivaloj	64
Por ĉiam	67
Reveno	68
Kiel princino trovis amon	70
Pri maljunulo, kiu rakontante princinon ravis	76
EL LA KORBO:	
Riĉa maljunulo	81
Hodiaŭ ne!	82
Sekreto de urno	83
DU MARISTAJ	
87	
GUTOJ DE INTIMO:	
Amil	93
En sonĝo nur . . .	94
Nirvano	95
Ho, tagoj dolĉ-amaraj!	96
Peza vino	99

DIRTIS DANKEMO:

Miozotoj	103
•Papilioj•	104
Super «Printempo en la aŭtuno» de Julio Baghy	106
D-ro Kamarýt sepdekjara	107
Sub-sento festa	108
Tiuj plej eminentaj	109
Kiam vi larmojn verŝas . . .	110
Ŝustr 25 jarojn prezidas la klubon!	111
Ho, mi ĝin vidas, pioniro!	112
Antaŭ Kriŝtnasko 1948	113

HETAJRO DANCAS:

Hetajro dancas	117
Antaŭ spigulo	118
Ĵaluzo	121
Nupta nokto	122
Ekŝtazo	123
Iros amikar' . . .	124
Laŝta kareso	125
Omeno	126
Forlasita	127
Orgio	128
Kiam doloro kulminas	129
Pro vi patrino!	130
Sonĝo	131
Dum vibrad' de l' kordoj	132
Renkontigo	133

ENHAVO	135
--------	-----

